*N-ro 0013, aperas dusemajne*

# Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

*Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado* — *septembro (1) - '92*

## Manifestacii samtempe

Organizoj de nia movado kutime ne havas monon por pagitaj reklamoj en la amaskomunikiloj, televido, radio, ktp, do malofte nia afero aperas en ili. Sed sen publika atento kaj subteno ni malfacile povos atingi, ke en diversaj forumoj oni komencu trakti pri la internacia lingva problemo.

Tamen estas maniero, kiu ebligas la altiron de la publika opinio sen elspezo de grandaj monsumoj. Temas pri la surstrataj demonstracioj, okazintaj ekde 1988. en diversaj urboj, laŭ la iniciato de Verdula E-Asocio. Komprenu bone: ne temas pri protesto kontraŭ io, sed temas pri la publika manifestado de nia ekzisto, kaj de niaj postuloj!

Tiaj surstrataj demonstracioj okazis en 1988. en Romo, en 1989. en Romo kaj Parizo, en 1990. en Parizo, Romo, Dublin kaj en 1991. samtempe en Londono, Bruselo kaj Romo!

### Samtempe en diversaj urboj

Tre grava trajto de tiuj surstrataj eventoj estas la samtempeco! Ili okazas en la sama tago en diversaj landoj, kio montras la internaciecon de la postulo, kio estas apenaŭ neglektebla faktoro por neesperantistaj instancoj!

### Publikan debaton!

La ĉefa celo de tiuj surstrataj eventoj estas altiri la atenton de la ekstera mondo, kaj postuli publikan debaton pri la internacia lingva problemo. La konkretaj celoj en unuopaj landoj povas varii, depende de la loka situacio. (Ekz. en la landoj de Eŭropa Komunumo oni povas uzi la sloganon: "Per komuna lingvo al Eŭropo") **Sed la vojo por tio ĉie estas la publika debato pri la internacia lingva problemo!**

Ni devas levi la problemon ne pri esperanto, sed pri la internacia komunikado! Kiam oni diskutos pri la temo, neeviteble aperos ankaŭ esperanto, des pli, se ĝuste niaj organizoj iniciatis la aferon!!!




### Ĉi-jare: la 10an de oktobro

Dum la Viena UK estis kunsido pri la ĉi-jaraj surstrataj demonstracioj. Do, ĝi okazos laŭplane en Belgio, Britio, Italio, Hungario kaj eble en Nederlando kaj Francio!

Surbaze de la ĝisnunaj rezultoj, ni alvokas ĉiujn esperantistojn por samtempa surstrata manifestado la **10-an de oktobro!**

Estas klare, ke por aranĝi ĝin, en la koncernaj landoj estas necese havi organizan teamon, kiu havas plurajn taskojn:

» difini lokon de renkonto, kaj la promen-vojon;
» prepari ian programon ĉe la fino de la surstrata promeno;
» informi kaj mobilizi kiel eble plej da esperantistoj;
» prepari afiŝojn, port-tabulojn, striojn;
» prepari kaj multobligi disdoneblajn informilojn, flugfoliojn;
» en letero tuj peti la organizadon de publika debato pri la internacia lingva problemo ĉe la nacia televido, radio, ktp;
» anonci al la polico la daton kaj lokon de la manifestado;
» zorgi pri la fotado de la demonstracio;
» antaŭ la manifestado informi la amaskomunikilojn (prefere la sekciojn pri novaĵprogramo kaj enlandaj politikaj aferoj de nacia televido kaj radio) pri la pasintjaraj eventoj, kaj averti ilin pri la ĉi-jara, kaj inviti ilin persone vidi ĝin;
» post la manifestado prepari raporton kun fotoj pri la evento, kaj sendi ĝin al la gazetaro, petante ilian aperigon.

La sukceso de tiu demonstracio multe dependas de la zorga preparo, kaj de la nombro de ĉeestantoj. Ni ne atendu tujan miraklon, sed konsciu, ke se ni faros nenion - okazos nenio, eĉ la jam akiritajn rezultojn de esperanto ni povas perdi!

**Do, ek al iu konkreta paŝo!** Ni ne havas multan tempon, do vi tuj kontaktu vian landan asocion, ĉefdelegiton, aŭ aliajn aktivulojn! Jen adresoj de tri konkretaj organizantoj:

» **ITALIO:** Alberto Menabene, via Monti Sibillini 3, I-00141 Romo;
» **BRITIO**: John Spencer, 30 Adolphus Road, London, N4 2AY;
» **HUNGARIO**: Kultura E-Asocio, H-1675 Budapest, pk. 87. Tel: 1288258.

## Kaunas atentis al la esperanto-movado

Ĉirkaŭ 30 personoj "ĝuis" la aventurojn de lim-trapasadoj, veturante de la viena UK per aparta aŭtobuso al la 65a kongreso de SAT en Litovio.

Dum la kongresaj 10 tagoj Kaunas atentis al la e-movado. Pri la kunveno aperis grandaj artikoloj en 5 landaj gazetoj, kaj serio de mallongaj informoj estis publikigitaj en pluraj aliaj revuoj. La malfermon partoprenis la vicprezidanto de litovia parlamento Kazimieras Motieka, kaj la urbestro Arimantas Raĉkauskas, kiu eĉ mem estas esperantisto. La prezidanto de SAT Ivo Peyraut dum la vojaĝo al la kongreso grave malsaniĝis, kaj li povis sekvi la eventojn el la berlina hospitalo nur per oftaj telefonkontaktoj.




Al la kongreso aliĝis 617 homoj. Partoprenis ĝin entute 452 esperantistoj el 28 landoj, inter ili 302 (= 2/3) el la eksa Sovetio (109 el Rusio, 100 el Litovio ktp.) kaj 150 (= 33 %) el aliaj landoj (53 el Polio, 38 el Francio, ktp).

daŭrigo sur la paĝo 5.

# La eltiritaj citaĵoj

*eble iel povos kontribui al la diskuto en EVENTOJ, diskuto vole-ne-vole resumanta ideojn, kiuj fortigas kaj malfortigas sin reciproke tra jardekoj de nia esperantista ekzistado. Mi citos asertojn de diversaj statusoj, sen distingi, ĉu temas pri deklaro en grava dokumento, hipotezo en studo, aŭ frazo en respondo al intervjuanto.*

(daŭrigo de EVENTOJ n-ro 12/92.)

1990. "Mi kredas, ke el la vidpunkto de la jarcentoj, en la longa periodo ni devas tamen ne perdi nian belan idealon, ke e-o estu la dua lingvo por ĉiuj tra la mondo."

*John Wells, Budapeŝta Informilo, 1990.02.01.*

1990. "Batali por la *fina venko* laŭ la malnova strategio karakterizanta la plejparton de la esperanto-societoj, signifas ankaŭ elekti aliancanojn inter ŝtatistoj, aŭ plej ofte, pasive akiri ilin dumvoje. La danĝeroj de tiu ĉi strategio fariĝis pli evidentaj en 1990, ĝuste dek jarojn post la lanĉo de la Manifesto de Raŭmo.

... Soldatoj rekrutitaj inter diktatoroj, advokatoj dungitaj inter koruptuloj: de Francisco Franco (alta protektanto de UK 1968) ĝis Fidel Castro, kun la apenaŭ evitita kolonelo Papadopoulos; ni konkludas, ke, dank' al la pracelanoj, la *bona* lingvo ... estas en *bonaj* manoj!

*Nia invito al optimismo (morala raporto diskutita kaj aprobita de la ĝenerala asembleo de LF-koop, 1991.04.21.)*

1981. Nian evoluon mi do vidas jene:

» la elformiĝo de esperanta komunumo (socio) ĝis 1920.
» la stabiliĝo de la socio - ĝis 1980.
» la epoko kiu komenciĝas (epoko penetra) — ?
» la unua sojlo — ?
» la dua sojlo — ?
» la fina venko — ?

*Jerzy Leyk: Kio bremsas evoluon En: Pola esperantisto, 1981/3-4.*

1991. La Manifesto de Raŭmo estis lanĉita la 1-an de aŭgusto 1980 - antaŭ dekunu jaroj. En si mem la manifesto estas tre mallonga skizo... Tiuj ideoj trovis redifinon kaj plilarĝigon per postaj dokumentoj, ekzemple la deklaro de PSEK, la studoj de Sándor Révész kaj Jerzy Leyk.

... Oni komencas koncepti la esperantistaron ne nur kiel disciplinita movado, kiu devas konkeri la mondon, sed ankaŭ kiel komunumon, funkcianta pli-malpli kiel disa minoritato tra la mondo. Tia diasporo, kiel disa minoritato, havas unu ĉefan referencon en la lingvo, en la komuna lingvo Esperanto. Do, estas profunda modifo de la sociologia bildo de Esperanto. La raŭmismo opinias, ke la esperantistaro restos minoritato dum longa tempo. Oni ne scias, dum kiom da tempo, sed sendube tre, tre, tre longe. Cetere, ne estas eble indiki movadon, kiu fariĝis majoritato; eĉ la kristanismo ne havas majoritaton en la mondo. Do nenio vere konkeras la mondon iam, krom se ĝi respondas al iu baza fundamenta bezono. Kaj certe la bezono pri komunikado ekzistas, sed la kontentigo, kiun donas esperanto, estas iu aparta kontentigo.

*D-ro Giorgio Silfer: Pozitiva evoluo al la konservativa silento. En: Bulgara Esperantisto, 1991/12, p. 6-9.*

1991. Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj... Kvankam naivaj revoj pri baldaŭa *fina venko* povas naski flustrojn, certe iel forigendajn, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso... signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de esperanto ne okazos:
- sole per klopodoj de la nunaj parolantoj...
- sen la klopodoj de la nunaj esperantistoj...

*El Proklamo de Voss, laŭ Internacia Pedagogia Revuo, 3/91, p.4, Eventoj, 2/1992.*

1967. ... la kampoj rikoltendaj restas ĝishorizonte flavaj. Nur manplenoj valoraj akiritas. Sed ni festas

La laborfinon jam komence! Venoj de tero-esploristoj de l' spirito apenaŭ lasis spurojn, sed azenoj

neniam mankas kun kultisma mito blekstreĉi buŝojn...

*Edwin de Kock: (E)pistolo al poetoj tro tradukemaj laŭ Poemaro kaj prozeroj, 1967.9.28, p. 45.*

1991/1992. Kiel harmoniigi la desuprajn oficialajn kampanjojn kun la desubismaj kulturaj iniciatoj por ke ili povu minimume kunekzisti?

*Stefan MacGill, Eventoj, 3/1992.*

1992. ... de honoroficanto oni ne povas postuli perfektan laboron...

*Lu Wunsch-Rolshoven, laŭ Seminaria Gazeto TEJO-PSEK, Eventoj, 2/1992.*

1992. Esperanto estu konsiderata kiel unu el la ekzistantaj lingvoj!

*KRUCO Eventoj, 6/1992.*

1992. Eble ni ne tro insistu krei propran kvazaŭ-nacion...?

*Sándor HIDEG, Eventoj, 6/1992.*

1992. Kiuj primokas la heredaĵon de Zamenhof: *interna ideo, stranga forto, fina venko*, tiuj "samideanoj" (?) eble senkonscie, sed ĉiamaniere batas en ĉerko (!) de la esperanto-movado la lastajn najlojn.

*Paulo Bennó, Eventoj, 7/1992.*

## Teorio

1991. Miaopinie, se temas pri la karakterizaj trajtoj de esperanto, la unuan lokon okupas ne propedeŭtiko, sed la ebleco kontakti novmaniere... Ni urĝe bezonas novajn sloganojn: For la izolitecon! Transŝpasu la limojn! ... Ni lanĉu do la sloganon: Internaciecon en la praktiko!

*KRUCO Laŭ Internacia Pedagogia Revuo, 3/1991, p.6.*

1991. Esperanto estas kulturo. Tiuj, kiuj lernas kaj uzas la lingvon, havas eblecon ekkoni novajn kulturajn valorojn, eksenti la ĝojon de la kontakto kun nekonata kultura mondo.

*Georgi Mihalkov, Bulgara Esperantisto, 1991/12, p.4.*

1991. En la konservativa linio la ideo estas, ke ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi. El la raŭmisma ideo ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas nian kultur-modelon. ...Mi opinias, ke dum la okdekaj jaroj, en la fazo de pura teorio, multo estas sufiĉe ellaborita, do oni devas en fazo multe pli praktika produkti ... tiujn servojn, tiujn varojn, kiuj utilas por altigi la kvaliton.

*D-ro Giorgio Silfer, Bulgara Esperantisto, 1991/12, p.7.*

1991/1992. La jubilea dudek-kvina konferenco de ILEI *(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)* akceptis ... dokumenton por kontribui al la strategiaj debatoj en la Movado. Por loki ĝin historie, memoru la Deklaracion de Tireso (Svedio) 1969, kaj la Manifeston de Raŭmo (Finnlando) en 1980. Konferencinte en Norvegio, dudek kaj dek jarojn post tiuj eventoj kaj aliaj dokumentoj, ŝajnis oportune rekonsideri ilin. Nia rezulto nek celas lanĉi novan direkton, nek proklami novan revolucian malkovron, sed resumi tion, kion la plimulto de esperantistoj jam decidis kaj komprenis por si mem, kaj iel sintezi la pretendojn de la antaŭaj dokumentoj kune kun taŭga sinteno por instruistoj.

*Laŭ Internacia Pedagogia Revuo 3/91, Eventoj, 2/92.*

1992. La suprajn asertojn retajpis kun emfazoj, kaj rekomendas relegi la kompilinto

*Blazio Vaha, Hungario.*

LA KVINPETALO
internacia staĝejo de LF-koop

respondecas: Suzanne Bourot
administras: Societo Yvonne Martinot
pĉk Limoges 2408-62 H

route de Civaux
F-86410 Bouresse (Francio)
tel. +33-49-428074

## Faka aplikado

### Ekologiaj artikoloj bonvenas

Ĉe la eŭroparlamenta grupo *"La Eŭropaj Verduloj"* bonvenas ĉiu artikolo, ankaŭ en esperanto, pri ekologiaj problemoj kaj ĉiu informo pri ekologiaj okazaĵoj, kie (ankaŭ) esperanto estas laborlingvo. Nuntempe tiu grupo havas 30 membrojn: Belgio 3, Francio 8, Germanio 8, Hispanio 1, Italio 7, Nederlando 2, Portugalio 1. Bonvolu atenti: *La Eŭropaj Verduloj* interesiĝas NE pri esp-o, sed pri uzado de la Internacia Lingvo por ekologiaj celoj!

La Verda Partio diskonigis sian programon ankaŭ en esperanto okaze de la eŭropa baloto.

Kontaktadreso:

*S-ro Leo COX, La Eŭropaj Verduloj, Eŭropa Parlamento, Belliard-str.97-113, B-1040 Bruselo, Belgio. Tel.: +32-02-234 23 15.*

### Genealogia societo

Silezia Genealogia Societo serĉas kontaktojn kun genealogiaj societoj en la tuta mondo.

*ul. Dubois 3, Pk. 16, PL-50-952 Wroclaw 17, Polio. Tel./fakso: +48-71-226954*

## Komerca aplikado

## Kontaktoj serĉataj!

Karaj gekolegoj, se vi konas iun firmaon pretan kunlabori kun litovaj eksportaj - importaj firmaoj pere de la internacia lingvo esperanto pri interŝanĝado de diversaj varoj, krudmaterialoj, ktp. bv. sciigi ilin pri esperanto-merkato en Litovio!

*UAB "STATYBA", c/o A. Ramonas, Pk. 15, LT-5030 Kėdainiai, Litovio.*

* * * * *

### IKS-bazaro

Novfondita privata turisma kaj komerca entrepreno el Zagrebo deziras kunlabori kun similaj entreprenoj eksterlande pere de la internacia lingvo.

Kontaktadreso:

*Internacia Kultura Servo, pp 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio/Hrvatska.*

* * * * *

La akcia kompanio "NOOR TURIST" (Juna Turisto) el Estonio serĉas eksterlandajn partnerojn por akcepti junularajn turismajn grupojn. En ĉiu veturonta grupo devas esti unu esperantisto - interpretisto.

Kontaktadreso:

*Noor Turist, August Kilk, pk. 141, EE-0090 Tallin, Estonio.*

### Tajpi, komposti, ktp...

"Mi faras ĉiuspecajn laboraĵojn per komputilo kun laserprintilo: mi tajpas (en esperanto aŭ ne) tekstojn, librojn, tezojn, k.a.

Prezoj kaj pagkondiĉoj laŭ la laboro."

*S-ro Stéphane DUPIN, 90 bis rue Roger Salengro, F-94490 Ormesson, Francio.*

## Ukraina Verdula Partio volas uzi esperanton

Dum la 2-a kongreso de la Ukraina Verdula Partio (UVP) estis akceptita rezolucio, kiu alvokas ĉiujn membrojn lerni kaj uzi esperanton por la komunikado inter verduloj de la tuta mondo. Prezidanto de la partio, Jurij Ŝĉerbak estis elektita ministro pri defendo de la naturo. Unu el la kunprezidantoj estas I. Puŝkar - aktiva esperantisto kaj naturprotekta aganto.

*M. Heller*
*membro de Koordina Konsilio de UVP.*
*El Litova Stelo 4/1991.*

**ESPERANTO EN LA PRAKTIKO**

***Sendu ankaŭ Vi informojn pri ĉia ekstermovada uzo de esperanto!***

## Terminologia Esperanto-Centro en Kladno

TEC de UEA por faka lingvo en esperanto transiris el la militinta Zagrebo al Kladno en ĈSFR. Ĝia gvidanto estas inĝ. Jan Pospíšil. TEC preparos terminarojn, fakajn vortarojn, kaj tekstojn, por ke esperanto povu penetri en la sciencon kaj teknikon.

Por akiri pluajn monrimedojn por TEC estis fondita kaj jure registrita "Nezávislá terminologická nadace" (Sendependa Terminologia Fondaĵo), Al la fondaĵo eblas donaci ne nur monon, sed ankaŭ ĉekojn, akciojn, obligaciojn. Jam deko da ĉeĥaj aktivistoj de la sciencteknika sekcio promesis donaci al TEC kaj ĝia fondaĵo dek procentojn de siaj akcioj, kiujn ili akiros per la kupona privatigo. Ĉu oni povas kalkuli ankaŭ je via helpo?

*Inĝ. Jan Pospíšil,*
*Leningradská 3112, CS-272 04 Kladno-4, Ĉeĥoslovakio*
*tel. +42-312-781547.*
*Starto 2/92.*

Esperanto-Servo pri Komercaj Interrilatoj, ESKI

## Denove pri ESKI!

Mi sciigis la ideon pri ESKI al UEA, kiu prezentis ĝin kiel artikolon al la redakcio de *EVENTOJ*, kompreneble kun mia konsento. Tiam mi ankoraŭ ne sciis multe pri la aktivado de IKEF. Feliĉe mi ricevis diversajn reagojn flanke de IKEF, kiuj baldaŭ konvinkis min, ke multo pri kio mi parolis, jam de IKEF estas farata.

Mi ankaŭ ricevis kelkajn numerojn de la revuo La Merkato kaj konstatis, ke ĝi provas esti aktiva rilate al kontaktoj, kiujn entreprenoj orient-eŭropaj kaj aziaj bezonas, kiuj volonte komercas kun landoj en okcidenta Eŭropo kaj Usono. Laŭdon ĝi havu!

Kio mankas miaopinie, estas centraj adresoj en ĉiu lando, al kiuj ĉiaj entreprenoj povu adresi sin, kiuj volonte establos utilajn kontaktojn kun malfacile atingeblaj firmaoj, industrioj ktp., plejofte pro lingvaj malfacilaĵoj. Ion tian mi celis kun la ideo pri ESKI. Kompreneble estas eble uzi la kontaktadresojn (de la perantoj), kiuj publikiĝis en La Merkato, sed mi pensas, ke tio ne estis la intenco.

Cetere mi ne volas dispecigi la bonajn kontaktojn, kiuj jam ekzistas sur ĉi tiu kampo, nek volas akceli, ke ekestu nova organizo. Kontraŭe, mi volonte volus, ke IKEF akceptu la ideon, ke ĝi akcelu la fondon de landaj centroj, kiuj estu direkta helpo al ne-esperantistaj organizaĵoj, entreprenoj, ktp. Espereble la IKEF-estraro volas transpreni la torĉon.

*inĝ. Tammo Kanter*
Ten Utlodreef 24, NL-7921 HP Zuidwolde.

*Startigi novajn servojn ne estas simpla afero. Oni devas zorgi pri teknikaĵoj, pri ejo, pri financoj, ktp, - kaj ĉefe pri la reklamado.*

*Ĝis la landaj ESKI-centroj povas iĝi memstaraj, eble estus oportune funkciigi ilin - en la komenca periodo - en la kadroj, aŭ kun la aŭspicio de la landaj E-Asocioj. Ilia adreso kutime estas ĝenerale konata (telefonlibroj, publikaj informservoj ktp), ili povas enmeti informojn pri ESKI en siajn flugfoliojn, nacilingvajn informilojn, ktp. Kompreneble la aŭspicio de landaj E-asocioj estas necesa nur en tiuj landoj, kie la IKEF membroj, aŭ la entreprenistoj-esperantistoj ne povas/volas fari la Servon mem.*

*Laŭ mi estas du BAZAJ POSTULOJ por ekfunkciigi ESKI:*

- *La Servo devas labori profesinivele! (Komprenu bone: temas ne pri salajriteco, sed pri la labor-kvalito). Eventualan fikvalitan laboron la ekstera mondo konsideras kiel kvalito de la tuta esperanto-movado!*
- *Oni devas garantii long-daŭran funkciadon de la Servo. La reklamado kaj propagando portos rezultojn eventuale nur post monatoj aŭ jaroj! Se dume la ESKI-centro ĉesos funkcii, la ekstera mondo konsideros nin fidiletantoj...*

*László Szilvási, Hungario*

**inter helpo**

## Fama ĉeĥa biero

Ĉu vi havas intereson pri kvalita, tamen ne multekosta ĉeĥa biero? Ni povas ĝin oferti al vi jam kun prezo 0,35 DEM/0,5 lt aŭ konservojn 0,33 lt por 0,45 DEM. Garantio de la biero en boteloj min. 1 monato, en konservoj min. duono de la jaro. Ni povas eksporti ankaŭ aliajn varojn, aŭ kunlabori en la sfero de turismo. Seriozajn ofertojn sendu tuj al nia adreso, kien ni invitas komercistojn por eventuala detala traktado.

*INTERHELPO, pk. 44, CS-150 00 Praha 5, Ĉeĥoslovakio. Tel. & fakso: +42-2-542993.*

Organizaj demandoj

# Meditado post grandsignifa artikolo

Forte kaptis min la ĉefartikolo de EVENTOJ (Nro 10): *"Kiuj ni estas esperantistoj?"*. Ĉar ĝi tuŝas problemon, kiu strikte ligiĝas al edukado, kaj ĉar la prezentita temo estas pli ol aktuala, mi sentas la bezonon aldoni mian opinion.

La konstato de la aŭtoro László Szilvási (:silvaaŝi) estas ĝusta komparante niajn zorgojn kun tiuj de naciecoj. Plue, mi tute konsentas, kiam li akre distingas esperanto-parolanton disde esperantisto, konsiderante ĉi-lastan plenkonscia esperanto-parolanto.

**Kaj jen la demando de demandoj: kial el pluraj miloj da novaj esperant-parolantoj (esperantuloj) ne fariĝas esperantistoj?**

Ĝuste rezonante venas fine la aŭtoro al edukado, sed temas pri edukado en plej vasta senco. Estus granda mistrafo redukti edukadon al lerneja aŭ lingvokursa edukado, ĉar post tiuj kursoj ekestas ja tre multaj (ne ĉiuj kompreneble) potencialaj esperantistoj, kaj ne ĉiam la instruisto aŭ kursgvidanto kulpas pri la perdiĝo de esperanto-parolantoj. Ne ĉiam, sed vere estas ĉi-terene multaj farendoj. Ni rigardu almenaŭ kelkajn laŭvice:

1. Niaj lernolibroj estas tro **lingvocentraj**. Pri kio mi pensas? Ni opinias, ke sufiĉas transplanti pli-malpli bone la gramatikon kaj leksikon de la Internacia lingvo, kaj tuj ekestas bonaj esperantistoj. Kiel la praktiko pruvas, tio estas grava eraro, ĉar la lingvo estas nur unu el la konsistigaj elementoj. Mi, ekzemple, estas konvinkita pri tio, ke nia instruado estus pli ol duoble efika, se la lernantoj estus konsciaj pri la misaĵoj de **lingva diskriminacio**. Niaj lerniloj honteme prisilentas la fakton, kiu estis la motivo de ĉiuj artefaritaj lingvoprojektoj.
2. Prepari al internacieco oni povas per **vera internacia kunagado**. Sed vidu, ni esperantistoj plej ofte nur parolas pri ĝi, kaj apenaŭ fruktuzas la avantaĝojn, kiujn prezentas al ni la senlimeco de nia lingvo. Miaopinie estas rekte malutile ricevi la plejmulton de E-impresoj disde samlingvanoj, des pli ke ĉiokaze uzo de Esperanto estas snobismo kaj ĉiu mense sobra persono baldaŭ transiras al la uzo de la komuna etna lingvo, sekve komencanto facile miskonkludas. Se la impresoj venus de alilingvanoj, ligiĝo al Esperanto estus pli forta kaj rezistiga.. Tial mi ne komprenas, kial ni volas ĉion solvi je nacia nivelo. Al vera esperantisto la nacia solvo povas esti la lasta alternativo. Sen translimaj vivaj kontaktoj oni ne atingas internaciecon. Ni bezonas do strukturon, kiu harmonias kun la spirito de la Internacia Lingvo.
3. Kio malhelpas disvolviĝon de internaciismo en la nuntempa socio? Grandparte absoluta **nekono de alietnaj kulturoj**, ĉefe tiuj de malgrandaj popoloj. Por altiri okulfrapan ekzemplon, mi demandas: kion hungaroj scias pri la kulturo de serboj, kroatoj, slovenoj, aŭstroj, slovakoj, ukranoj, rumanoj, do ĉiuj popoloj nin ĉirkaŭantaj? Preskaŭ nenion. Kaj kiu lernis nenion, ofte opinias: tia simple ne ekzistas. Jen el kio venas multfoje sento de superemo, troa nacia fieremo.

   En tiaj cirkonstancoj kiu do povas esperi veran harmonion inter diverslingvaj popoloj? Por forigi tiun nenormalan situacion, la esperantistoj devas ion fari, ĉu ne?
4. Esperantismo kaj toleremo estas nedisigeblaj nocioj. Tamen ne mankas ĉe ni disputoj, kvereloj malbonintencaj, kiuj fontas el envio, malŝato al proksimuloj. Tio estas parte komprenebla, ĉar la homo estas pekema. Sed doloras al mi vidi, ke ankaŭ ni venis jam al tiu stadio, en kiu oni hontas elmontri amon aŭ respekton al samcelanoj. Se ni ĉiuj iros laŭ apartaj, individuaj vojoj al nia "sankta celo", ni neniam atingos venkon, ĉar nur pli-malpli kompakta premgrupo povas esperi sukceson. Niajn klopodojn devas penetri fido kaj toleremo, per diktatoraj, postulemaj rimedoj oni ne efektivigas humanajn ideojn.

   Estas do necese konscie **eduki al toleremo**, ĉar sen ŝi ni neniam eliros el la nuna stagnanta situacio.

Fine mi povas koncize resumi miajn aldonajn pensojn jene: ni devas **agi pli vaste**, tro strikta, sole poresperanta laboro ja ne trovas sufiĉe larĝan bazon. Ni devas trovi aliancanojn el tiuj, kiuj simile al ni reprezentas humanajn valorojn, kaj ni, aliflanke, senhezite dissemu ĉiujn noblajn valoraĵojn, kiuj venas el la ideo de la Internacia Lingvo kaj kuraĝe levu voĉon kontraŭ ĉiaspecaj malnoblaj restaĵoj de la pasinteco.

*Kruco*

# Eldonkvantoj...

"Esperanta kulturo estas lingva, do libra kulturo. Fakte libroj - ekde la unua, laŭaspekte modesta de la jaro 1887. - estis ĉiam esencaj en la evoluigo de nia lingvo kaj en la riĉigo kaj nuancigo de ĝiaj esprim-kapabloj. Fieras ni pri la atingoj de nia originala literaturo kaj propagande distrumpetas ni, ke ĝi estas komparebla kaj laŭkvante kaj laŭkvalite kun multaj literaturoj de etnolingvoj.

Kvankam - pli bone: pro la fakto, ke - la supraj asertoj ĝustas, analizo de la esperanta libromerkato metas nin en profundan embarason. Ekzemplo: La eldonejo PRO ESPERANTO reeldonis en 1990. la jam de jardekoj elĉerpitan originalan romanon "Maria kaj la grupo" (Emba, 172 p., 25,50 gld), kies temo estas la esperanto-movado. Oni povus konjekti, ke ĉiu ŝatanto de la originala literaturo emus aĉeti tiun verkon. Kaj jen sobra fakto: en la unua jaro post ĝia apero vendiĝis nur 70 ekzempleroj." *(Herbert Mayer "Kiel statas nia kulturo?" en "La Dua Jarcento", IEM n-ro 159)*

Tiuj plendoj de Herbert Mayer: "Nur 70 ekzempleroj" - venis en mian kapon dum legado de noticoj de Viktor Ŝklovskij (unu el eminentaj rusaj literaturologoj kaj kulturagantoj). En "Eldonkvantoj de niaj revuoj" li notas:

"Eldonkvanto de "Literatura Gazeto" estis "apenaŭ cent" (Barsukov, vol. III, p.14). Al ĝi kontribuadis Puŝkin.
Ankaŭ eldonkvanto de "Teleskopo", al kiu kontribuadis Belinskij estis tiom malgranda, ke la eldonisto konscie pereigis la revuon, publikiginte en la 15-a kajero "Filozofian leteron" de Ĉaadaev. "Europano" kun la nomoj de Ĵukovskij, Jazykov, Boratynskij kaj Puŝkin havis 150 abonantojn. Sed "Nuntempulo" atingis la kvanton de abonantoj 500.
"Biblioteko Por Legado" havis sukceson, kion, certe, oni ne povas riproĉi al ĝi.
"Mirgorod" kaj "Arabeskoj" ne disvendiĝis"

Supozeble estas sufiĉe trafa paralelo el ora epoko de rusa literaturo: ja "Nuntempulo"-n redaktis A.S.Puŝkin mem, al Biblioteko "Por Legado" kontribuadis Lev Tolstoj, la aŭtoro de "Mirgorod" kaj "Arabeskoj" estis N.V. Gogol - por konfirmi la vortojn de Eŭgene de Zilah (vd. "La Gazeto" n-ro 31) pri cent esperantistoj, kapablaj krei evoluitan kulturan vivon en esperantio. Eldonkvanto apenaŭ estas taŭga kriterio por speguli la valoron de koncerna verko aŭ revuo, nek signo de kultura malevoluo.

Sed... (ĉu por dubigi min mem?) - trafis la manojn numero 123 de KONTAKTO kun verko de Alessandro Amerio ("Ĉu mi rajtas enmiksiĝi?"), kiu bele rivelas la ĝeneralan tendencon de monda kulturvivo ankaŭ en esperantismo:

*"Jen tiu milo aŭ kelkaj miloj da gejunuloj, kiuj vojaĝas eksterlanden por viziti kongresojn, perfekte kongruas kun mi, kaj miaj geamikoj... Mi tute ne emis partopreni la pompan altekostan bufedon dum la UK, mi preferis iri diskoteken: tie mi trovis neniun plenkreskan kamaradon, kun kiu diskuti pri literaturo kaj movado, nur gejunulojn, kiuj dancis kaj parolis pri "evoluiĝo"... Dum la programero "laŭtlegado de fruaj Zamenhofaj verkoj", okaze de la lasta kultura vespero, kiun mi partoprenis, mi iom oscedis... Preskaŭ neniam mi aĉetas ion en libroservoj, kaj en tiuj okazoj, efektive temis pri Valano... La lasta parto de la artikolo donis la finan baton al mia skuita memfido, aperas nomoj, titoloj, kaj eĉ citaĵoj, je kiuj mi estas alergia. (...) Bedaŭrinde, mi opinias, ke ni devas fari en Esperanto amasfenomenon..."*

Jen aktiva pozicio, kiu sufloras, ke eĉ 70 ekzempleroj venditaj estas tro multo por esperantismo. Se en epoko de A.S.Puŝkin la eldonkvantoj estis malgrandaj pro amasa analfabeteco en Rusia imperio, nun la eldonkvantoj en esperantio malgrandas pro... mi supozu, amasa atako kaj penetro en ĉiujn ĉelojn de kultura vivo de aroganta amaskulturo, - ĉu ne estas la temo por aparta artikolo?

*Natan Procenko,*
*Survoje N-ro 11/1992.*

## Aranĝoj

### Internacia Foiro de Esperanto-Turismo

26. septembro - 2. oktobro, Bydgoszcz, Polio

La Foiro estas la plej prestiĝa kunvenejo por organizantoj de esperanto-turismo. Ĝin partoprenas reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj vojaĝoficejoj, aplikantaj esperanton.

Dum la Foiro oni resumas la ĉi-jarajn organizajn kaj financajn demandojn, priparolas kaj preparas (multaj eĉ jam surloke subskribas) la kontraktojn por la sekva jaro.

Dum la Foiro okazas ankaŭ la jarkunveno de *"MONDA TURISMO"*, ĵus akceptita en UEA kiel "aliĝinta faka asocio".

La ĉi-jara (jam 18-a) Foiro okazos en la hotelo "Esperanto" de la vojaĝoficejo Esperantotur. Kontribuo al la elspezoj de la Foiro: 200 NLG persone (UEA-kodo: etur-p), aŭ samvaloro en zlotoj surloke.

La partopreno en la Foiro estas rekomendita al ĉiuj organizoj, kiuj ĉefterene aŭ flanke okupiĝas pri e-turismo. Ankaŭ individuaj interesiĝantoj estas bonvole akceptataj.


Monda Turismo, ul. Sklodowskiej-Curie 10, PL-05-094 Bydgoszcz, Polio.

*Telefono: +48-52-415744.*
*Telefakso: +48-52-415115.*

MONDA TURISMO ESPERANTO

### Novjara Junulara Renkontiĝo

en Swieradow Zdrój, Polio



La komuna aranĝo de PSEK kaj Junulara Sekcio de Silezia Esperanto-Asocio okazos inter la 28-a de decembro ĝis la 3-a de januaro en montara kuraclоko Swieradow Zdroj kun tre pitoreska ĉirkaŭaĵo, alloga por skiantoj, piedturistoj kaj naturŝatantoj.

Dum la aranĝo krom la distraj aferoj oni traktos ankaŭ la temon: "Estis arbaroj, ĉu ne estos arbaroj?". La novan jaron oni renkontos per la tradicia maskobalo!

Kotizoj inter 180 kaj 280 NLG, resp. 1.050 kaj 1.400 mil zlotoj por ekssoclandanoj.

Aliĝo validas nur kun antaŭpago.

Kontribuantoj al la programo povas interkonsenti pri eventuala rabato.

La nombro de litoj estas limigita, do decidu rapide! Pliajn informojn petu ĉe:

*Elzbieta Kulik,*
*ul. Orzechowa 107. m. 2,*
*PL-50-540 Wroclaw, Polio.*

## 65-a kongreso de SAT

daŭrigo de la paĝo 1.

Dum la kongreso okazis ĝeneralaj kunsidoj de SAT, kunsidis 5 SAT-frakcioj (pacista, naturista, liberecana, sindikatista kaj liberpensula), kaj okazigis la ĝeneralan kunvenon ankaŭ TANEF (Esperanta Fakgrupo de Naturamika Internacio).



La prezidio dum la inaŭguro de la kongreso

Dum la kongreso estis akceptita deklaracio pri la neceso de solidareco inter la diverslandaj laboruloj, rezolucio pri radioelsendoj, kaj gvidrezolucio pri SAT-aferoj.

La kongreso havis vere agrablan, allogan etoson, kio pleje dankeblas al la bona organizado de litoviaj esperantistoj. La organiza teamo de Litovia E-Asocio malgraŭ la eksteraj malfacilaĵoj lerte kaj operative reĝisoris la aranĝon. La etoson ne ĝenis eĉ la fakto, ke nokte oni ofte devis uzi la teretaĝajn fenestrojn anstataŭ la pordoj, aŭ ke anstataŭ A. Korĵenkov (gvidanto de Ruslanda E-Asocio, veturinta tamen al Vieno) oni surloke devis trovi novan gvidanton por la literatura laborgrupo, ktp.

La sekva kongreso de SAT laŭplane okazos en aŭgusto 1993. en Kazanlak, Bulgario.

## Konkurso en Vilnius

La tradicia, 24-a konkursado en arta kreado de esperantistoj okazos dum la 3-a kaj 4-a de oktobro en Vilnius, Litova Respubliko.

La konkursoj okazos en jenaj branĉoj:



» 1. prozo originala;
» 2. poezio originala;
» 3. kantoteksto originala;
» 4. melodio originala;
» 5. deklamado;
» 6. arta legado de prozaĵo;
» 7. rakontado pri iu okazintaĵo;
» 8. kantado;
» 9. koloraj diapozitivoj;
» 10. pentraĵoj por afiŝo pri e-kurso en ajna lingvo.

Informoj pertelefone:

*Vajtila'viĉus (+7-012/442706 loĝ.).*
*Laŭ Litova Stelo 5/1991*

**LA ĈI-JARA "IS" DE GEJ OKAZOS NE EN SCHLESWIG, SED EN BAD KLEINEN!**

Pliaj detaloj en la sekva numero!

## Afrika agado

### La unua tutlanda e-renkonto

Post ĉ. 4 jara preparo, en la komenco de julio okazis la *Unua Tutlanda Renkontiĝo* en Dar es Salam, Tanzanio.

Kunvenis reprezentantoj de ĉ. 20 kluboj, kaj ĉeestis 2 svedinoj kaj unu italo. La distriktestro de Dar es Salam partoprenis la inaŭguron, la reprezentanto de la ministro pri edukaj aferoj - la fermon de la renkontiĝo.

Dum la "kongreso" la nomo de *Tanganyika Esperanto-Asocio* estis ŝanĝita al *Tanzania E-Asocio*, estis akceptita nova statuto (baziĝanta sur membreco de kluboj), kaj estis elektita nova estraro.

Dum la renkontiĝo estis transdonitaj la donacoj de Sveda E-Federacio, la Sveda Junulara E-Unuiĝo, kaj de diversaj kluboj: granda kvanto de libroj, T-ĉemizoj, tajpilo, ĉapeloj, ktp.

90 minuta sonregistraĵo sur kasedo pri la Unua Tutlanda Renkontiĝo estas mendebla kontraŭ 5 USD ĉe:

Anita Dagmarsdotter,
Mariehamnsgatan 18, S-164 79 Kista, Svedio.


Adreso por salutleteroj, korespondderoj, por viaj eventualaj subtenoj, kaj por ĉiatipa kontakto:

*Tanzania E-Asocio,*
*SLP 23390 Dar es Salam.*

## Movado

# Borso de E-manuskriptoj

La centro *INTERKULTURO* (Kozevarjeva 12, SLO-62000 Maribor, Slovenio) organizis la unuan internacian renkontiĝon de posedantoj de ĉiuspecaj manuskriptoj en esperanto la 31-an de majo 1992. en Maribor. Kolektiĝis 15 personoj el Slovenio, Kroatio, Aŭstrio kaj Italio por trakti la celojn kaj la estontan agadon de la Borso. Jen la konkludoj:



» 1. *INTERKULTURO* daŭre gvidu la Borson kiel agentejo por perado de e-manuskriptoj.

» 2. *INTERKULTURO* eldonos, ekde aŭtuno 1992, bultenon en kiu aperos ĝis 100-vortaj priskriboj de ĉiu anoncata manuskripto. La bultenon ricevados ĉiuj abonantoj, ĉiuj e-eldonejoj kaj ĉefaj e-gazetoj. (Petu abonilon kaj anonc-formularon.)

» 3. *INTERKULTURO* organizos ĉiujare 1-2 renkontojn por manuskriptoposedantoj, eldonistoj kaj presistoj, en kiu oni traktos ankaŭ problemojn de tradukado kaj iniciatos projektojn.

**La sekva Borso okazos en Maribor la 12-13-an de decembro 1992.**

*Zlatko Tisljar,*
*Esperanto, junio 1992.*

▲▼▲▼▲▼▲

# Konkurso pri arta traduko

La Gimnazio *Bányai Júlia* en la urbo Kecskemét, Hungario, organizas tutlandan konkurson pri arta traduko por lernejanoj!

La kaŝnomaj konkursantoj devos traduki ĉ. 20 linian e-tekston al la hungara en du kategorioj: baz- kaj mezlernejanoj.

Gajnintoj de ambaŭ kategorio estos premiataj okaze de la decembra Zamenhof-tago. Petu detalan alvokon de:

*Gimnazio Bányai Júlia,*
*Esperanto-Fako,*
*Nyíri u. 11, H-6000 Kecskemét, Hungario.*

▲▼▲▼▲▼▲

# Du asocioj en Sankt-Peterburg

Ekde julio en Sankt-Peterburgo ekzistaj du apartaj e-centroj. Unu el ili, nomata Esperanto-Asocio en Sankt-Peterburg estas la tradicia e-organizo, (prezidanto: Ljudmila Titova, Srednegavskij prosp. 9, kv. 45, RUS-199106 St-Peterburg, Rusio. Tel: +7-812-2174052), la alia "Sankt-Peterburga E-Societo *ESPERO*" okupiĝas ĉefe pri turismo, uzante la teknikaĵojn de la e-vojaĝoficejo de UNIVERS. (pk. 130, 197022 St-Peterburg, Rusio, tel: +7-812-2344759).

*Laŭ Kongresvoĉo (65a SAT), n-ro 7 kaj 10).*

# Novaj Cseh-instruistoj

Dum la 26-a ILEI-Konferenco en Bratislavo, Ĉeho-Slovakio okazis Cseh-seminario grado "C", inkluzive diplomigan ekzamenon. La seminarion kaj ekzamenon gvidis prof-ino Katalin SMIDELIUSZ el Hungario. Partoprenis ĝin 5 personoj el 3 landoj. Jen la nomoj de sukcesintoj:

D. Kowalska el Nowy Sacz - Polio,
J. Tokarska el Chorzow - Polio,
A.P. Tabacki el Katowice - Polio,
G. Tilleux-Craenhals el Erpent - Belgio,
J. Verveij el Veliko Tirnovo - Bulgario.

Gratulojn, kaj sukcesan aplikadon de la lernita metodo deziras al ĉiuj la estraro de IEI.

**Se organizantoj de e-kursoj bezonos bonan instruiston (23 adresoj el 4 kontinentoj) bv. turni sin al adreso de:**

*Internacia Esperanto-Instituto,*
*Riouwstraat 172, NL-2585 HW Hago,*
*Nederlando.*

KONTAKTO
Socikultura revuo de TEJO

Kroata Esperanto-Uniuĝo, KEU

## *Nova e-organizo en Kroatio!*

"La ekzistinta e-organizo de Kroatio jam longlonge laciĝis membre, labore kaj organize, ne anoncinte sin kontraŭ la neagado kaj neordo. Nenia voĉo al Eŭropo kaj al la mondo. Tia e-organizo dum monatoj ne kunvenadis, kaj ne donis voĉon pri la terura situacio en Kroatio.

Nur fajrero de Zagreba E-Ligo vorte, letere kaj preleginte en e-kongresoj kaj kunvenoj elradiadis la terurajn novaĵojn pri la Patrolando. La agemaj esperantistoj post la ekscio, ke laŭstatute *Kroata E-Ligo, KEL* ne povas antaŭenigi la laboron, kaj pro militaj kialoj ĝi ne havos eblecon kunveni ... decidis labori solaj, kiel oni diras *obstine antaŭen.*

Kroata Esperantista Uniuĝo havis la fondkunvenon la 14-an de decembro 1991. en Zagreb, kie la membroj akceptis la statuton, kiel jura daŭriganto de la samnoma organizo, fondita la 2-an de januaro en 1909.

Post la fondo ekis la entuziasma laboro. Estas jam fonditaj la junulara kaj pedagogia sekcioj. La plej nombra kolektiva membro *Kroata Fervojista Societo* intertempe estis akceptita en IFEF, kaj en Zagreb oni fondis junularan societon. Estis preparataj diversaj kontribuaĵoj por la e-elsendoj de Kroata Radio - ĝis ĝi ekzistis, estis lanĉita nova interna informilo *"Kroata Esperantisto"*. Nun estas preparata al eldonado dulingva poemkolekto de kroatoj, vivantaj en Hungario, estas organizata la libroservo, la Pasporta kaj Gastiga servo, ktp.

Prezidanto de KEU: Radenko Miloŝeviĉ, la sekretario: Marija Beloŝeviĉ.

Adreso de KEU:
*Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.*
*laŭ Kroata Esperantisto 1/92.*

*Dum la UK en Vieno la Komitato de UEA kiel "Landa Asocio" rekonis ne KEU, sed KEL.*
*La red.*

# Studi esperanton en Svedio

En Svedio ekzistas la nura eblo en Eŭropo studi esperanton intense dum ses semajnoj. Tio estas ebla ĉe la popola altlernejo kun esperanto-fako en Karlskoga.

Ĉar la lernejo estas parto de la sveda studosistemo, ĝi ricevas monon de la ŝtato, kio rezultigas vere favorajn prezojn *(loĝado en unupersonaj ĉambroj, manĝado dum 5 tagoj de la semajno, eblo mem fari manĝaĵojn dum la semajnfinoj, kaj la tuttempaj studoj kostas nur 2450 svedajn kronojn).*

Krome eblas uzi bibliotekon, lingvo-studion, sportejon kaj eĉ ricevi instruadon en aliaj fakoj sen pluaj kostoj. Daŭriga kurso en esperanto okazos de la 2-a de novembro ĝis la 18-a de decembro. **Kursanoj de nepagipovaj landoj povas akiri stipendion.** Kontaktu:

*Karlskoga Popolaltlernejo, Esperanto-fako,*
*p.k. 192, S-69124 Karlskoga, Svedio.*

▲▼▲▼▲▼▲

## Espero anstataŭ glavo

En la numero aŭgusto (2)-92 de EVENTOJ aperis artikolo "Esperantista solidareco". La nomo kaj UEA kodo de la tiea agado estas "ESPERO" anstataŭ la unua varianto "Ne al glavo". Sendante vian subtenon bv. mencii la novan kodon: ESPERO.

*inf. laŭ Esperanto 8/92.*

## Alvoko!

# Diplomoj pri esperanto

En 1989 aperis ĉe UEA mia Bibliografio de disertacioj pri esperanto kaj interlingvistiko.

Mi intertempe kolektis proksimume 15 novajn titolojn, kiujn mi ĉi-jare ŝatus aperigi en unua aldono al la Bibliografio. Sed certe ekzistas aliaj verkoj nekonataj al mi. Pro tio, mi petas ĉiujn komuniki al mi titolojn kiuj ne troviĝas en la unua eldono. La bibliografio estas utila nur se kiel eble plej kompleta.

Bonvolu mencii la nomon kaj adreson de la verkinto aŭ/kaj de la universitato/altlernejo en kiu la laboraĵo estis verkita. Elkoran anticipan dankon.

*Edward Symoens,*
*Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout, Belgio*
*(Esperanto, junio 1992.)*

# Redaktoro por "Koncize"

Ulrich Matthias, redaktoro de *Koncize,* komuna internacia bulteno de 12 junularaj e-asocioj, post pli ol 3-jara sukcesa laboro pro siaj multaj aliaj taskoj baldaŭ demisios.

Estas serĉata nova juna aktivulo, kiu transprenus la redaktadon de la fama internacia bulteno. La *redaktoro* devas teni la kontaktojn kun la landaj respondeculoj, kaj zorgi pri la aperado. Interesiĝantoj bv. kontakti:

*Germana Esperanto-Junularo,*
*Rheinweg 15, DW-5300 Germanio.*

## Lingvo

### Am-aro en Jun-io

Foje mi partoprenis renkonton IJS (Internacia Junulara Semajno) en Hungario, kie mi renkontis ĉarman junulinon Marta; krom ŝia nomo ankaŭ ŝi ravis, fascinis min kaj poste ankoraŭ longe hantis en mi ŝia dolĉa personeco.

Dum interparolo kun ŝi al mi enkapiĝis: mi devus ludi kun amo, ja tio povas esti dirko eĉ al tenebraj arkanejoj, do certe al tiu ĉi almesimila belulino. Do mi komencis...

Geamantoj ofte elektas iun simbolon por siaj sentoj, tio povas esti stelo, arbo... kial ne eriko, ja Am-eriko estas tero de revoj en okuloj de multaj. Tiuj ĉi tipoj de deteriĝoj povas esti am-bonoj.

Oni multfoje donacas ion, ekzemple am-fibolon, amuleton eĉ foje am-uleton.

Kelkaj fartas am-orfe en am-iò, kvankam ili multfoje estas am-idoj.

Inter la am-araj nuboj oni elpensas novajn esprimilojn por refuti polvajn radikalojn, tiaj estas ekzemple: am-bu-lanco (maskla ilo), amhara (ne pri lingva diferenco pensante), am-ilo.



Plej karaj estas ĉiam la fruktoj post am-pleksiĝo kaj kisoj po-lipe. Tiam svarmas am-idoj kaj antikve ĉiam plej gravis amo-filoj. Por tiu ĉi celo en kelkaj landoj oni konstruis gineceojn por am-inoj pro sia verva ag-amo.

En la kruda flanko de kontakto aperis vespertoj de am-etistoj kaj am-peristoj kiuj eble ignoris aŭ tute malkapablis senti eĉ am-onon.

La frazo sekva de multaj certe ne estas konsentita, kvankam estas vera: Nur dum geedziĝo aperis ilia am-oro.

Ĉu tiom da amo povas amarigi? Mi pensas ke ne. Precipe ne suferas am-asoj.

*Fragmento el la manuskripto "Frenezaj Ludoj"*
*Kopirajto ĉe Csaba NÉMETH, Várfal u. 2, H-9400 Sopron, Hungario.*

1 1992
LITOVA STELO
Revuo de Litova Esperanto Asocio

## LEA havas propran domon!

La domo de A. Zilbernik, bopatro de L. Zamenhof estas senpage transdonita al Litovia E-Asocio per la dekreto de la Premiero de la Litova Respubliko n-ro 241 p. de 10.03.1992. Adreso de la estonta nova sidejo: Kaunas, str. Zamenhof 5.

Ni aldonu, ke tiu gajno estas rezulto de longaj persistaj penoj de la vicprezidanto Povilas Jegorovas. Li ne mallevis la manojn dum la nuna nestabila situacio, dum ŝanĝiĝoj de regpotencoj en la respubliko kaj en la urbo, dum pretendoj je la domo de diversaj aliaj organozoj. Gratulon kaj dankon!

*laŭ Litova Stelo, 1/92.*

## Ne plu sub la esperantista flago...

Karaj geamikoj,

Jam preskaŭ 26 jarojn mi, kiel adepto de movado kreita de pola okulisto, klopodas doni voĉon al apenaŭ aŭdeblaj handikapuloj kaj batali kontraŭ nenecesa blindeco en grandaj partoj de la mondo.


Tio ĝis la fino de la pasinta jaro okazis en la kadro de la agado *Esperantistoj Esperigas Esperantojn*. Sed ĉar nia diligenta kolegaro nur malmulte atentis ĉi tiun iniciaton, ĝi sub E3-formulo bedaŭrinde mortis. Problemo estis, ke la esperantistaro dum kvarona jaro neglektis sciigi al mi, ĉu ĝi entreprenas ion, kaj se jes, kion kaj kiel.

En la numero julio(2)-92. de *EVENTOJ* vi povas legi, ke mia profesio estas ĵurnalisto (devas esti: klinika social-helpisto) kaj ke mi post duonjarcenta agado "decidis transigi la aferon al formala institucio". La vero estas, ke mi, unuopulo, simple daŭrigos helpi al vidhandikapuloj, sed ne plu sub flago esperantista. Tre bedaŭrinde ĝis nun mi trovis neniun, kiu pretas kaj kapablas malfermi vidantajn okulojn de gesamideanoj. Ĝis tiu tempo mi direktos min ekskluzive al nevidipovaj aŭ malforte vidantaj homoj en landoj oftalmologie postrestintaj!

Pere de via helpo mi sukcesis por tiu ĉi jaro adopti 26.000 infanojn en Vietnamio, kiujn minacas iom post ioma blindiĝo sekve de nesufiĉo da A-vitamino. Kore mi dankas!

Akceptu miajn plej korajn salutojn, kaj esprimojn de profunda danko. Por via eventuala uzo, mia poŝtbanka numero restas: 10 20 100. Kompreneble vi povas uzi ankaŭ mian UEA-konton: jajt-s.

*Jacques TUINDER, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH, Heemskerk, Nederlando.*




## Se vi gastos en Madrido

La datumoj en la lasta adresaro de Pasporta Servo ne estas korektaj, do se Vi volas gasti en Madrido, kontaktu rekte la lokan perejon:

Hispana Esperanto-Federacio,
Rodriguez San Pedro 13-3$-7,
E-28015 Madrid.

Telefono: +34-1-4468079. La laborhoraro varias, do lasu mesaĝon se vi maltrafas deĵoranton.

La anonco en la adresaro de Pasporta Servo estas malkorekta pro mikso de du malsamaj aliĝiloj, kaj aldone la poŝta adreso malaktualiĝis.

Teamo de junuloj kune peras la gastigadon, detale informos vin pri la diversaj ebloj kaj kondiĉoj en ĉiu momento, kaj kontaktigos Vin kun la gastigonto.

Vi sciu, ke:

- Kondiĉo por gasti ĉe madridaj esperantistoj estas antaŭa interkonsento.
- La oficejo ne estas gastejo. Unue kontaktu telefone aŭ letere, kaj atendu la respondon.

La venonta PS-adresaro estos kompleta, kaj korektita pri Madrido. Dume, bonan madridumadon!

*Marcos Cruz*

## Esperanto en radio

## Esperantistoj mem mortigas esperanton!

***Multaj samideanoj esprimis bedaŭron pro malapero de E-elsendoj de Svisa Radio. Ĉe la Pola Radio restis nur duono de elsendhoroj.***

***Tian malbonan rezulton miaopinie kaŭzas ni mem, karaj geamikoj.***

***Ĉu multaj sendis almenaŭ poŝtkartan saluton al e-redakcio de Pola Radio por instigi ilin plu daŭrigi la E-elsendojn? Ĉu vi mem skribis almenaŭ unu leteron al iu e-redakcio? Verŝajne ne!***

***Kaj post tiel indiferenta, mi kuraĝas diri hontinda konduto ni ankoraŭ bedaŭras...***

***Mi alvokas Vin sincere: ni ne plu estu pasivaj anoj de la "rondo familia". Ni ekagu kuraĝe, uzu mem kaj instigu aliajn labori por kaj per esperanto en la praktiko, en ĉiuj sferoj de homa vivo.***

*A. Ramonas, pk. 15, LT-5030 Kédainai, Litovio. El SAT-Kongresvoĉo n-ro 8.*

## Invito al Kalifornio

Esperantistoj vivas ankaŭ en la regiono de la San-Franciska golfo, kaj ili sopiras renkonti ankaŭ vin, se la bonventoj alportos vin tien.

Ĉar niaj eblecoj renkonti eksterlandajn samlingvanojn estas malmultaj, ni renkontiĝas ĉiumerkrede (krom festotagoj) por e-babilado kaj vespermanĝo. Eksterregionaj gastoj estas speciale bonvenaj inter la 6a kaj 7a ĉiun merkredan vesperon ĉe la Kafejo Firenze (2116 Shattuck Avenue, Berkeley) por kafumado, babilado kaj (v)espermanĝo en apuda restoracio.

Por pli da informoj ne hezitu telefoni al unu el la jenaj telefonoj:

*+1-510-6530998, -8492001, aŭ -2220187.*
*Ionel Onet, Berkeley*

## Por via notlibro

*Dum la Viena UK estis elektita nova estraro de UEA. Por ke ili povu bone plenumi sian taskon, ili bezonas multajn informojn. Jen ilia adreso (por uzi. sed ne por misuzi ilin):*

**d-ro John C. WELLS, prezidanto**
kunordigado, reprezentado.
5 Poplar Rd. London, SW19 3JR, Britio.
Tel: +44-81-5420302, fakso: +44-71-3834108.

**Ian JACKSON, ĝenerala sekretario.**
29 Graham Rd. Chiswick, London W4 5DR, Britio.
Tel: +44-81-9956244, fakso: +44-71-7268561.

**d-ro Ulrich LINS, vicprezidanto**
regiona kaj landa agado.
Gemarkenstr. 150, DW-5000 Köln 80, Germanio.
Tel: +49-221-6803250.

**Mark FETTES**
informado, KER, CED.
322 Cumberland Str. Apt. 3, Ottawa, Ont., K1N 2J7 Kanado.
Tel: +1-613-5620785.

**Hans BAKKER**
financoj kaj administro de CO-UEA.
Kastelenstraat 231/II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando.
Tel: +31-20-6421853.

**Michaela LIPARI**
kulturaj aferoj, kongresoj.
Viale G. Cesare 223, I-00192 Roma, Italio.
Tel: +36-6-39726198, fakso: +36-6-39726169.

**d-ro So GILSU**
azia agado.
Yangchon PO kesto 12999, Seoul - 158600, Koreio.
Tel+fakso: +82-2-6465413.

## Korespondi deziras

Ĵusa kursfininto serĉas korespondajn amikojn:

*Salatiel Rodriguez Baptista,*
*F.Av.Br.Rio Branco, 253;*
*BR-25800 Tres Rios-RJ, Brazilio.*

Esperantistoj (profesoroj, studentoj, laborantoj) de la universitato de la urbo Chengdu serĉas korespondajn partnerojn dise en la mondo. Viajn leterojn direktu al:

*Docento Mu Bing, Chengdu Universitato,*
*CN-610081 Chengdu, Sichuan, Ĉinio.*

17-20jaraj fraŭlinoj el la rusia urbo Vyborg serĉas gekorespondantojn. Skribu al la adreso de ilia instruistino:

*Valeria Cvetkova,*
*pk. 366. RUS-197022 S. Peterburg, Rusio.*

f-ino Palmira Milasiene, str. Debreceno 20-65, LT-5811 Klaipeda, Litovio.

S-ro Seka Hyacintha, O3 BP 572, Abidjan 03, Cote d' Ivoire, inĝ. dez. kor. tm.

## Anoncetoj

Pri eventuale nericevitaj aŭ fuŝaj numeroj bv. informi nin, ke ni povu interveni kaj reklamacii ĉe la gazet-senda servo de la poŝto!

*Lingvo-Studio Budapeŝt,*
*Redakcio de EVENTOJ*

Juna lingvoinstruisto serĉas laboron dum la venontaj vintraj aŭ (plej multe) someraj ferioj. Mi kapablas instrui la germanan, svedan, danan lingvojn krome de esperanto. Krom tiuj lingvoj mi parolas la anglan. La lingvokono estas dokumentita pere de la gepatreco de la lingvo aŭ per oficialaj dokumentoj el la respektivaj landoj. Se vi volas lerni lingvojn, aŭ volas ekigi lingvokursojn aŭ -lernejon, kontaktu: Sascha Gion Fröhlich, Ölands Folkhögskola, Ölands Skogsby, S-38693 Färjestaden, Svedio, aŭ

*Sascha Gion Fröhlich, Am Bergsee, DW-7880 Bad Säckingen, Germanio.*

Internacia Vendo-Reto SORTIMENTO (IVERS) invitas vin kunlabori por multe profiti finance kaj morale. Detala priskribo de la projekto kaj aliĝilo riceveblas kontraŭ 2 IRK-j. Adreso:

*Agentejo SORTIMENTO,*
*H-6100 Kiskunfélegyháza, Pf.138. Hungario*

Ankaŭ la redakcio de Esperanto-Aktuell, la revuo de Germana Esperanto-Asocio estas atingebla per telefakso. Bonvolu uzi la numeron:

*+49-251-835277.*

En septembro malfermiĝos nova Esperanto-Salono (malgranda teo-trinkejo) ĉe la artpalaco *Jincheng*, en la centro de la urbo Chengdu. Espereble la Salono fariĝos renkonta centro, kie interesiĝantoj pri esperanto povos trovi spertulojn, resp. eksterlandanoj povos trovi la lokajn samideanojn.

Pliaj informoj ĉe:

*S-ro Mu Bing, Chengdu Universitato,*
*CN-610081, Chengdu, Sichuan, Ĉinio.*

Se vi deziras viziti Kroation, sed vi ne scias kien kaj kiel iri, kie dormi, kie renkonti esperantistojn, skribu (kun 1 respondkupono) al ni, kaj ni klopodos helpi al Vi!. Skribu almenaŭ unu monaton antaŭ la ekvojaĝo!

*Gastiga Servo de Kroata E-Unuiĝo,*
*Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.*

Mi serĉas miajn korespondintojn. Mi estus feliĉa, se al mi skribus ankaŭ interesiĝantoj pri astrologio, vojaĝo, sano kaj nutraĵo. Mia nova adreso estas:

*Lilia Petrova Konstantinova,*
*c/Teodoro Llorente, no 22, pa 5,*
*46960 ALDAYA (Valencia), Hispanio.*

## Interese...

### Kamaĉo: ĉu literatura snobo?

Niaj legantoj jam konas la bele ilustritan revuon El Popola Ĉinio kiu celas la internacian legantaron. Lastatempe mi malkovris alian periodaĵon aperantan en Ĉinio sub la titolo *"La Mondo"* kiu celas la ĉinan legantaron; ĝi estas la organo de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝi havas bele ilustritan kovrilon kaj kelkajn esperantajn artikolojn, sed la plejparto estas ĉinlingva, do por ni nekomprenebla.

Sur p.23-4 de la sama numero ni legas daŭrigon de artikolo kontribuita de Georgo Kamaĉo pri la originalaj romanoj en esperanto. Kunlaboranto de la pornografia Kancerkliniko, tiu ĉi juna literatura snobo estas senmaskigita en Israela Esperantisto (No. 108, 1991.) kiel ekstrema antisemito. Li esperantigis la hispanlingvan Letero el Palestino de S. Alba kiu ĝemas pri la situacio de la araboj en Israelo. No do ne miru, ke Kamaĉo jam publikigis almenaŭ du akrajn kalumniajn artikolojn kontraŭ Israelo akre rebatitajn de Rih Dalio en Britio.

Tiu ĉi laŭmoda kavaliro nun malkovris, ke La Litomiŝla Tombejo de Karolo Piĉ estas majstroverko de la mondliteraturo! La naiva George Lagrange en Parizo subtenas tiun opinion favore komparante la verkon kun la poemoj de Kalocsay (ke romano ne estas poezio, tio evidente ne maltrankviligas Lagrange'on). Nek zorgas Kamaĉo pri tio, ke Piĉ estas la ĉefo de la "Praga Skolo", la plej granda danĝero por la internacia lingvo. La naivaj ĉinoj verŝajne nenion scias pri ĉi ĉio kaj publikigis la artikolon sen komento nur por ŝtopi spacon.

*Nov-Zelanda Esperantisto, marto-'92, p.9.*

*Rim: Georgo Kamaĉo estas juna hispano, internacie konata en junularaj e-medioj. Lin ni konas kiel klera literaturulo, kiu ofte defendas la interesojn de araboj (ne nur en Israelo sed ankaŭ en Eŭropo), - sed estus malfacile akcepti lian difinon kiel "ekstrema antisemito", aŭ kiel "literatura snobo".*

*La Red.*

**... funkciado kaj la kvalito de la esperanto-movado dependas de la esperantistoj mem! ...**

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.
A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában:
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.
*EVENTOJ*, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavoj.